

Universala Esperanto-Asocio



UN-agado 2023

Raporto de Humphrey Tonkin, majo 2024

Nia teamo

Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, reprezentanto al CoNGO
Francis M. Hult, reprezentanto de UEA al Unuiĝintaj Nacioj
Shneur Agronin, reprezentanto de UEA al Unuiĝintaj Nacioj
Rafael Lima, prizorganto de la retejo Esperanto por UN, redaktoro, grafikisto
Sofija Soskina, distribuanto de la informilo
Jon Liechty, prizorganto de la Fejsbuk-paĝo
Cesco Reale, gvidanto de la grupo ĉe UN-Ĝenevo
Hans Michael Maitzen, gvidanto de la grupo ĉe UN-Vieno
Mireille Grosjean, reprezentanto al CoNGO-Ĝenevo
Gilles Tabard, tradukanto
Sara Spanò, kunordiganto de formalaj rilatoj kun UN

Sub gvido de resp. Cesco Reale kaj Hans Michael Maitzen, kelkpersonaj grupoj dividas inter si la reprezentadon en Ĝenevo kaj Vieno. Pluraj aliaj personoj liveras laŭokazan helpon al la teamo.

Motivoj kaj celoj

UEA estas unu inter pli ol 5000 neregistaraj organizoj (NROj) kiuj havas iun specon de oficialaj konsultaj rilatoj kun UN kaj ĝiaj organoj. Kontraste al la granda plimulto de tiuj organizoj, UEA aktive kunlaboras kun UN sur pluraj terenoj, kaj ni ankaŭ kunlaboras kun aliaj NROj. Ekzemple, UEA estas elektita ano de la organiza komitato de la Konferenco de NROj (CoNGO), la asocio kiu reprezentas la interesojn de NROj antaŭ UN. Hult kaj Tonkin estas resp. prezidanto kaj vicprezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj, komitato kiu estis iniciatita de UEA kaj kies estraro enhavas reprezentantojn ankaŭ de la grandaj internaciaj organizoj de tradukistoj kaj de interpretistoj. Hult kaj Tonkin same kunlaboras en la ĉiujara Simpozio pri Lingvoj kaj UN, organizita de la Studogrupo pri Lingvoj kaj UN, en kiu la reprezentantoj de UEA estas ŝlosilaj rolantoj.

UN rekonas ses oficialajn lingvojn, kiuj estas uzataj por tradukado kaj interpretado, sed nur du lingvoj (angla kaj franca) estas la lingvoj de la sekretariato. Kvankam UN formale sekvas politikon de multlingvismo, en la praktiko la angla dominas, precipe en Novjorko kaj Vieno. Plejparte la stabanoj ne plene komprenas la principon de nediskriminacio rilate lingvojn, kaj tiun principon oni apenaŭ agnoskas. Ekzemple, en la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo *tute mankas* substancaj aludoj al lingvaj problemoj kiel tiaj. Sekve, la unua kaj ĉefa tasko de UEA estas atentigi pri la problemo: proponi Esperanton kiel solvon al neagnoskata problemo estas en si mem vane: unue necesas rekonigi la ekziston de problemo. Tiun principon ni sekvas.

Agado

Rilate la supre menciitan principon UEA ĝuis certan avantaĝon en la jaro 2022-2023: la prezidanto de la Ĝenerala Asembleo (kies prezidanto oficas dum unu jaro) estis Ambasadoro Csaba Kőrösi (el Hungario), kiu ĝenerale pozitive rilatas al Esperanto kaj agnoskas la problemon de lingva diskriminacio. La fakto, ke samtempe prof. Hult prezidas la Komitaton de NROj pri lingvoj, donis signifan avantaĝon. En februaro prof. Hult intervenis pri lingvaj demandoj en konsultiĝa kunsido de la Komitato de Ekosok (la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN) pri NROj, kaj en junio, dank' al liaj lertaj atentigoj, okazis granda virtuala kunveno pri multlingvismo kun UN gvidantoj, nome la menciita prezidanto de la Ĝenerala Asembleo, la estro de la departemento pri konferenca mastrumado (kiu i.a. respondecas pri la lingvaj servoj de UN), kaj la estroj de la departementoj pri politiko kaj pri juraj aferoj. Intervenis ambasadoroj el deko da landoj, kaj Tonkin por UEA, Hans Becklin por TEJO, kaj Mark Fettes por CED. Prof. Hult prezidis. UEA liveris interpretadon en Esperanto, apud interpretado en la ses oficialaj lingvoj de UN. Tio estas plej verŝajne la unua okazo en la historio de UN kiam tia UN-kunveno havis ankaŭ interpretadon en Esperanto. Inter la publiko estis pluraj membroj de UEA kaj TEJO.

En sia rolo kiel prezidanto de la NRO-komitato pri lingvoj, Francis Hult ankaŭ havis okazon interveni en februaro en la festa kunsido organizita de la Bangladeŝa Misio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.

Pere de sia retejo esperantoporun.org, direktata de Rafael Lima, UEA publikigas informojn pri UN en Esperanto, prezentas tradukojn de ĉefaj UN-dokumentoj, informas pri mesaĝoj de UEA al UN, proponas Esperanto-terminaron pri UN, prezentas la dumonatan informilon kiun ni produktas en tri lingvoj (Esperanta, angla, franca) k.s. La retejo estas vaste uzata.

La menciitan informilon redaktas Humphrey Tonkin. Ĝi aperas sesfoje jare. Ofte ornamas ĝin afiŝoj ellaboritaj de Rafael Lima por festi specifajn specialajn tagojn de UN. Por dekkvino da tagoj tra la jaro UEA preparas specialajn mesaĝojn direktitajn jen al UN mem, jen al NROj, jen al la esperantistoj. Ili aperas ĉiam en Esperanto kaj la angla, kaj kutime ankaŭ en la franca. Lima kaj Tonkin plejparte respondecas pri la enhavo de la mesaĝoj, kiuj estas sendataj ne nur al Ekosok sed ankaŭ al unuopaj NROj, depende de la enhavo. Ili kutime aperas ankaŭ kiel Gazetaraj Komunikoj de UEA.

En marto 2023, tripersona delegacio (Alain Favre, Stefano Keller, Nicole Margot) reprezentis UEA en la Konsilio pri Homaj Rajtoj, Ĝenevo (vidu Rev. Esp. aprilo). En aprilo 2023, en Kunveno por festi la 75-jariĝon de CoNGO, kiu okazis en la UN-sidejo en Vieno, UEA estis reprezentata de delegacio kiu konsistis el estrarano de UEA François Lo Jacomo, Humphrey Tonkin, Alfred Heiligenbrunner, Jane Edwards kaj Bernhard Tuidier.

UEA, en kunlaboro kun Esperanto-USA, havas oficejon en 777 UN Plaza, tuj apud la sidejo de UN en Novjorko. La oficejo rolas kiel okaza kunvenejo kaj kiel konvena kontaktpunkto kun aliaj NROj (inkluzive de CoNGO) kiuj havas oficejojn en la sama konstruaĵo.